# Aŭstraliaj Esperantistoj

## Novaĵletero de Ĉiuj Aŭstraliaj Esperantistoj

**RETADRESE AL ĈIU ESPERANTISTO EN AŬSTRALIO, NOVZELANDO KAJ PETANTOJ**



Redaktoro Roger Springer Provlegita de Franciska Toubale



PLENUMITA 19/09/2024 sepcentkvina eldono (unua eldono 26/09/2011)

**Subtenu vian Novaĵleteron**

Sendu novaĵojn, leterojn, fotojn, informojn al Roger Springer rogerspringer@tpg.com.au;

La limdato por sendi kontribuaĵon al AE estas mardo en la vespero. Merkredo estas tro malfrua .



**Pasintaj „Aŭstraliaj Esperantistoj“ korektitaj atingeblas je la suba adreso**

Ctrl+klaku la veran ligilon) http://aea.esperanto.org.au/australiaj-esperantistoj/?lang=eo

Ĉirkaŭ unu semajnon post la ĝenerala elsendo, la korektitaj kopioj estos sendataj al AEA. (Sen #)

# Esperanta Retradio klaku la bluajn vortojn



Donas bonan ĉirkau -5 minutan aŭskultadon kaj legadon ĉiun tagon

Ne estas facile elekti el la ĉiuj tagprogramoj  Do aŭskultu ĉiujn.

Pri la sonkvalito de paroladoj en kongreso 14/09/2024

## Interesaj faktoj por Propagando

***.Lernado de fremda lingvo postulas***

*Lernu legi la skribitan lingvon. Ofte ĝi ne agordiĝas kun la parolata lingvo...*
*Lernu la gramatikon. Ofte ĝi estas plena da esceptoj al la reguloj..............*
*Lernu vortliston taŭgan por via espera uzo.........................................*
*Lernu la standardan prononcon. Ofte ne agordas kun la parolata lingvo..*
*Lernu la lokan parolatan lingvon........................................................*
*Lernu la ĉiutage mallongigitan parolatan lingvon................................*
*Lernu la idiomojn de la lingvo ..........................................................*
*Lernu kiel kompreni la parolatajn respondojn al viaj demandoj............*

**Komparu Esperanton**
..Fonetike senescepta
..17senesceptaj reguloj
..Kunmetitaj vortoj
..Unu prononco
..Ne ekzistas
..Ne ekzistas
..Ne ekzistas
..Unu monda lingvo

## Esperanto ne havas tiujn malfacilaĵojn

La plej multaj Esperantistoj lernis Esperanton kiam ili estas plenkreskaj
Do ili estas tre toleremaj kaj helpemaj al lernantoj. *Roger Springer*

# Ĉe pariza frizistino



Ĉu ankaŭ vi spertis ke dum frizistino lavas vian hararon kaj malforte masaĝas vian kapon , sub via postaĵo kaj femuroj malrapide ondumas la fotelo?

Laŭdire tiu komforto celas malstreĉigi vin. Seanco je la frizejo egalas al meditado. Persone mi ege malŝatas tiun sperton. Masaĝo estas kvazaŭ dialogo inter la donanto kaj la ricevanto, kiun maŝino ne kapablas anstataŭi . Mi ne pretas amikiĝi kun roboto , eĉ simpatia, ĉu vi?

Franciska Toubale

## Aŭstraliaj Esperantistoj unua eldono 26/09/2011

Nia septembra monata prezentado por 2024



Guy MARTIN (Francio)

## Dispartigo de pura akvo : Kio okazas ĉe vi ?

Guy prezentos fotaron pri semajno en kiu mi partoprenis en julio 2024. Spertuloj en diversaj landoj kaj fakoj prelegis, debatis pri problemoj ligitaj al malĝusta dispartigo de pura akvo.

Pli precize en Francio, gravaj luktoj okazas pri: Akvorezervujegoj Ekde 20 jaroj, kelkaj agrikulturistoj decidis kultivi maizon, kiu bezonas multe da akvo por kreski. Pro klimatŝanĝo, ili ne plu havas sufiĉe da akvo en riveroj aŭ boradoj. Ili decidis konstrui akvorezervujegojn vintre plenigitajn per boradoj. Sed, tiel mankas akvo en subtera akvonivelo kaj nur 5 % de agrikulturistoj rajtas uzadi tiun konservitan akvon kiu somere vaporiĝas. (*Kontrolu mem vian tempon*)

Jen la ligilo:
https://us02web.zoom.us/j/86183971328?pwd=eDdOSjVhY0ZKY2srbG5aKzIrTENFUT09
Meeting ID: 861 8397 1328
Passcode: 565425

Ni ŝatas ankaŭ demandi vin ĉu vi volas/pretas/ŝatas/povas prezenti ion dum unu sesio de niaj prelegserio?

Se vi ŝatus babili iomete, ni komencas la kunvenon 15 minutojn antaŭ la oficiala komenco (do 16:45 Sidneja tempo).

Ankaŭ restu iomete post la prezentadoj por neformala babilado.

Se vi maltrafas la eventon, eblos spekti ĝin ĉe nia jutuba kanalo, “Esperanto Australia” post kelkaj tagoj.

Plej amike, *Terry, Sandor, Esther, Jonathan, Joanne, Heather*
*La estraro de AEA (Aŭstralia Esperanto Asocio)*

# La Manlia Esperanto-Klubo




La Manlia grupo kunvenas je 10.30 atm ĝis 12ptm la unuan kaj trian sabatojn de la monato Unu taso da klubpagita kafo atendos vin. Ni renkontiĝas ĉe la oceana fronto kontraŭ la Restoracio Bluewater, Suda Stejno.

La 21a de septembro estos la tria sabato.

Venu! 02 9976 6320 *Roger Springer*

En la lastaj tri semajnoj per telefono kaj oficialaj ret-leteroj, (Jen), la sekretariino de la Ministro Pri Edukado de Sud-aŭstralio (Blair Boyer https://en.wikipedia.org/wiki/Blair_Boyer ) kaj mi pridiskutis la eblecon enkonduki Esperanton en iuj lernejoj. Tiucele al la ministrejo (31 Flinders St Adelaide. 5001) mi libroforme liveris fonan materialon pri profesia instruado de la zamenhofa lingvo. Unuaj impresoj de la registaraj koncernatoj, kies scioj pri Esperanto apenaŭ ekzistis, favoraj estis sed post kelka tempo venis oficiala respondo en kiu la ministro prokrastis decidon skribante ke la ekzistanta politiko daŭros por la nuno. Aliflanke, li du fojojn dankis adelajdajn esperantistojn kaj ankoraŭ prikonsideras inviton laŭgrade engaĝi sin en nian kongreson en januaro. Legantoj de ***Aŭstraliaj Esperantistoj*** de mi povas havigi la longan leteron de la ministro se ili volas. Bonvolu peti al Paul ĉe pauljdesailly@gmail.com

Intertempe, en *SEZONOJ,* t.e. senpaga bulteno de *LA ONDO,* aperis gravega artikolo en kiu deko da EU-politikistoj skribe subtenas Esperanton kaj do tion mi tuj angligis por informi ministron Boyer. La Esperant-lingva originalo memevidente estas elstara dokumento por informi la tut-mondan esperantistaron sed en nia mondoparto, en Britio, Kanado, Usono kaj en multaj aliaj landoj nepre necesas, mi opinias, disponigi anglan tradukon por informi decido-farantojn pri lastatempaj sukcesoj de Esperanto, tiom gravaj ke en la nuno la prezidanto de la EU-Komisiono, sinjorino Ursula von der Leyen kaj prezidanto Emmanuel Macron skribe referencas ne negative al nia kara lingvo. *Politikistoj de EU kaj Esperanto:* https://sezonoj.ru/2024/08/europo-5/

Tamen, por sukcesigi la ekstreme malavaran, influ-havan kaj long-daŭran kampanjon de la entreprenisto kaj mecenato, Etsuo Miyoshi, necesas miaopinie ne nur angligi la artikolon aperintan antaŭ nelonge en *SEZONOJ* por ke oni utiligu el ĝi informojn por influi politikistojn kaj aliajn eminentulojn en anglalingvaj landoj - sed iasence la angla varianto pli gravas tiucele. Kaj do, kara Roger, bonvolu aperigi anglalingve en speciala eldono de via ne malhavebla bulteno la tutan dokumenton *ETSUO* por favore influi politikistojn kaj aliajn gravulojn tra nia bela lando.



Amike. *Paŭlo Desailly* Por la angla kopio bonvolu peti al Paul ĉe pauljdesailly@gmail.com